# Hastu ... malrapide!

## *TESTO PRI RAPIDECO*

NOMO: PRECIZAJ DATO KAJ HORO :

*Maksimuma permesata tempo: 6 minutoj*

1. skribu viajn antaŭnomo(j)n kaj familinomon, kaj notu precize la aktualan daton kaj horon, ĉe la indikita loko
2. atente legu ĉiujn instrukciojn antaŭ ol komenci plenumi la taskojn
3. desegnu nubeton ĉirkaŭ vian familinomon
4. skribu sub tiun nubeton la markon kaj modelon de la aŭto kiun vi plej ŝatus posedi
5. skribu ĉi tien (maldekstre) viajn naskiĝdaton kaj naskiĝlokon
6. notu en la dekstran suban angulon la naskiĝjaron kaj knabinan familinomon de via patrino
7. skribu super la vorton 'rapideco' ĉiujn viajn telefonnumerojn kaj tiujn de via partnero / aŭ de via plej bona amik(in)o
8. desegnu sub ĉiun literon de via nomo belan kvadrateton
9. precize mezen de ĉiu kvadrato metu punkteton
10. ekstaru kaj ludu dum kvin sekundoj tamtamon sur via seĝo
11. dorse de tiu ĉi papero, skribu la nomon de plado kiun vi tre bone scias prepari
12. desegnu rektangulon ekzakte 16 centimetrojn longan kaj 1,2 centimetron altan:

13. enskribu en ĝin – per via plej bela manoskribo – la jenan ciferon:
    **0987846592848-9786-978678**
14. por indiki ke vi atingis tiun lokon en la testo, ekstaru kiel militisto, bele rektdorse, kun la manoj plate metitaj sur la pantalonon, kaj kriu vian nomon
15. desegnu en la aeron la jenan serion ĝis la litero 'P':
    **ABCĈDEF…**
16. en la maldekstran supran angulon de tiu ĉi flanko de la papero, desegnu kvar bestojn kiujn ĉiuj rekonus
17. skribu en tri lingvoj la nomojn de tiuj bestoj
18. alveninte al tiu ĉi punkto, denove stariĝu kaj kantu per "opera" voĉo: *mi atingis la 18an punkton*
19. skribu apud ĉiun vian desegnaĵoj/skribaĵon la numeron de la koncerna tasko
20. nun vi atente legis ĉiujn instrukciojn, neniun plenumu kaj metu surtablen vian skribilon
21. ĝuu la vidon de la aliaj kiuj hastas kaj trankvile atendu ☺.

## Klarigo pri la ekzerco

Tiu ekzerco estas fakte ŝerco: ŝajne oni devas ene de mallonga tempo plenumi tutan instrukciaron, sed kiu bone legas la duan punkton kaj sekvas ĝin fakte nenion pli devas fari ol legi kaj ĝui la vidon de tiuj, kiuj tro rapide rapidumas.
La gvidanto prezentu la teston tre serioze kaj tute videble atentu la tempon, ĉiuminute laŭtvoĉe retrokalkulante.